

Mond-kongreso en Interlaken por Monda Federala Konstitucio, 2-a parto
Claude Gacond, 262-a radioprelego, 1968.10.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni menciis nian partoprenon kiel observantoj por Radio-Svislando al la Monda Kongreso kunveninta fine de aŭgusto en Interlaken (Svislando) por labori al la redaktado de projekto de Monda Federala Konstitucio.

A.- La angla nomo de tiu kongreso estis **World Constitutional Convention**.

Cl.- La franca nomo estis **Assemblée Constituante Mondiale**.

A.- La pasintan semajnon ni donis ĝeneralajn impresojn kaj raportis pri la pozitiva laboro de la **Konsulta Konsilantaro**.

Cl.- Hodiaŭ ni raportos pri la debatoj en la **Asembleo de la Delegitoj**, kiu grupigis reprezentantojn el 35 landoj.

A.- La malferma sesio okazis la 27-an de aŭgusto 1968.

Cl.- Lia advokata moŝto Max Habicht prezidis tiun sesion. Nome de la svisa laborkomitato li salutis la ĵus alvenintajn delegitojn. Li poste legis telegramon skribita de la prezidanto de la Svisa Federacio, kiu deziris plenan sukceson al la Kongreso.

A.- Poste la prezidanto de la registaro de la Berna Kantono faris paroladon, en kiu li montris, ke kion la svisoj kreis dum jarcentoj, tion oni povus hodiaŭ konstrui mondscale. Ekzistas hodiaŭ Monda Konfederacio : La Unuiĝinta Naciaro. La transformo de tiu konfederacio de suverenaj nacioj en Federacion de Ŝtatoj estas ebla. Tion devis fari Svislando en 1848 por povi pluekzisti. Tion hodiaŭ devos fari la mondo, ankaŭ por povi pluekzisti.

Cl.- Poste sinjoro Huber, tiu klarvida prezidanto de la Berna Kantono, legis leteron skribita de la prezidanto de la Respubliko Somalio, lando kiu oficiale sendis observanton.

A.- Telegramo de la estro de la germana urbo Wolfach invitis la delegitojn daŭrigi dum la sekva semajno la kongreson en lia urbo. Tio fakte okazis.

Cl.- Inter la nombraj salutaj vortoj oni rimarkis tiun de la hinda ambasadoro R. K. Nehru. Li esprimis la opinion, ke la kaŭzo al la falsa vojo sekvata hodiaŭ por la mondaj aferoj estas la anarkio, kiu regas inter plene suverenaj nacioj. La mondaj problemoj trovas solvon, se la nacioj estus ŝtatoj submetataj al Monda Federala Registaro. Li bedaŭris, ke dum la dudek lastaj jaroj preskaŭ nenia progreso estis tiurilate efektivigita. Fariĝas necesege, ke la riĉuloj kaj malriĉuloj ekkunlaboru. Pri tio oni multe parolas, sed nenion realigas. Parto de la nacia suvereneco devas esti cedita profite al monda plurismo, kiu devus anstataŭi la hodiaŭan ĝangalon de la suverenaj registaroj. Ekzistas kreskanta interhoma dependeco. Se la Kongreso, kiu kunsidas en Interlaken, kapablos fari pozitivajn proponojn, tio helpos la popolojn poste fari pozitivajn decidojn kaj proponojn.

A.- Inter multnombraj leteroj, kiuj el ĉiuj mondpartoj salutis tiun kongreson, oni rimarkis tiun de la urbestro de Hiroŝima, Seisio Jamada.

Cl.- Post tiu malferma kunveno okazis ĉiutage du labor-kunvenoj la 28-an, 29-an, 30-an kaj 31-an de aŭgusto.

A.- Legante la francan tradukon de la debatoj okazintaj en tiuj kunvenoj, ni ricevas la impreson, ke io malbone funkciis. En la raporto pri la sesio de la dua tago oni rimarkas plendojn pro la nura uzo de la angla lingvo. Tiam estis decidite ĉion traduki francan. Sed kiam oni legas la skribitajn tradukojn, oni ofte nenion povas kompreni, tiom ili estas malbonaj. Oni komprenas, ke pro tiu problemo, kiu ne estis solvita, la debatoj ege malfacile disvolviĝis.

Mond-kongreso en Interlaken por Monda Federala Konstitucio, 2-a parto
Claude Gacond, 262-a radioprelego, 1968.10.16 & 19

Cl.- La ĉefa stud- kaj debat-dokumento estis nur angle redaktita.

A.- Temis pri projekto de mond-konstitucio publikigita sub la titolo *Comprehensive Outline for the Debate and Drafting of a World Constitution*.

Cl.- Ĝi estas ege interesa dokumento. Ĝia diskuto, laŭ nia vidpunkto, estus devinta disvolviĝi en labor-grupetoj. Tiuj grupetoj estus devintaj poste raporti pri siaj kunsid-konkludoj.

A.- Anstataŭ tio, dum longaj sesioj, oni diskutis por scii, kiu rajtas voĉdoni, kiu estas nura observanto. Kaj subite la lasta tago alvenis.

Cl.- Tiam oni malkovris, ke tiu Kongreso ĉefe estis utila pro la kontaktoj, kiujn ĝi ebligis kaj pro la propagando, kiun ĝi permesis favore al mondfederalismo, tio interne de la kongresanaro. Kaj la efektiva laboro, kiel ni raportis la pasintan semajnon, estis farita de la 14-membra **Konsulta Konsilantaro**.

A.- Nia vidpunkto eble ŝajnas severa. Sed ni pensas, ke antaŭ ol venigi delegitojn el 35 landoj, oni devus solvi kelkajn teknikajn demandojn. Inter ili la ĉefa estas la lingva demando. Hodiaŭ tiurilate ekzistas nur du solvoj : aŭ la multekosta samtempa tradukado en deko da lingvo, aŭ esperanto. Ĉiufoje, kiam organizantoj ne volos elekti unu el tiuj solvoj, tiam ili alvenos al senelireja situacio. Tio okazis en Interlaken. La miskvalito de la francaj dokumentoj liveritaj al la ĵurnalistoj kaj radio-observantoj atestas pri tiu fiasko.

Cl.- Sed la fiasko de kongreso ne signifas la fiaskon de la kongresa ideo. La mondfederalismo estas diskonigenda. Pro tio ni provos, dum venontaj elsendoj, pere de traduko de la libreto *La Paix [La Paco]*, verkita de la belgo *Léon de Meutter*, instrui al vi, kio fakte estas la bazo de la mondanismo.

A.- Kio lamigis la debatojn de la **Asembleo de la Delegitoj** ankaŭ estas tre varia antaŭpreparo al la kongreso mem. Dum kelkaj delegitoj estis bonege informitaj pri ĉiuj projektoj de Mond-Konstitucioj, estis legintaj ĉiujn verkojn, kiuj tuŝas al la temoj paco kaj Monda Federala Registaro, aliaj delegitoj apenaŭ sciis pri kio temas.

Cl.- Ni ekzemple aŭdis delegiton el Pakistano sin bazi sur la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro por demonstri, ke lia lando estas pacema.

A.- Kiel multaj delegitoj li ne estis liberigita de naciismaj antaŭjuĝoj kaj ŝovinismo.

Cl.- Sed multaj aliaj delegitoj estis ege valoregaj personecoj, kiuj ekde jaroj laboradas idealisme por la konstruo de nova mondo, kies fundamento estos la agnosko de la monda juro. Pri tiuj personecoj ni deziras raporti.

A.- Kio malfaciligas ankaŭ similajn kongresojn, tio estas la emo de delegitoj propagandi siajn personajn ideojn kaj ne interesiĝi pri la ideoj de la ceteruloj. Tion oni rimarkas en ĉiuj asembleoj, kie la publiko povas paroli. En la esperantaj kongresoj tio ankaŭ malfaciligas la disvolviĝon de debatoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-